



## KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir ! Nouvelle formule.

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30

\*\*\*

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

\*\*\*

Assemblée Générale le mercredi 25 mars au KoToPo

## KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES  
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Amélie AUBUT - Pscal FANTGAUTHIER- Marc-Olivier GRAZIANI -

## ANTAŬPAROLO

### Karaj membroj de Esperano Lyon,

La jarkunveno de nia asocio jam preskaŭ frapas ĉe la pordo!

Ni bezonas vin ; jes, VIN! por doni novan energion al nia kara asocio. Ideoj? Ho, ni havas multajn! Tempo? Nu... foje ĝi kaŝas sin kiel kato sub la tablo 😊

Sed la bona novaĵo estas simpla: vi povas helpi laŭ via propra maniero:

Vi povas:

- verki artikolon por nia gazeto (via plumo estas tre valora 🖋️);
- skani niajn arkivojn kaj savi nian historion;
- deĵori kaj bonvenigi homojn kun rideto;
- partopreni en la kursoj (jes, eĉ lerni estas helpo ĉar vi disvastigos la lingvon);
- kontakti partnerojn por organizi eventon;
- helpi pri publikaj komunikadoj... aŭ proponi tute novan ideon!

Ĉiu eta kontribuo estas granda paŝo por nia asocio.

Ni vere atendas vin multnombre ĉe la jarkunveno!

Venu, ridetu, partoprenu, kaj sentu la novan venton, kiu blovas en nia asocio!

Ĝis baldaŭ!

Plej Amike,  
Marc-Olivier GRAZIANI

## ☛ Mia Vojaĝo al Liono - Fatma EROĜLAN

Saluton al ĉiuj :) Mi ŝatus komenci per prezentado de mi. Mia nomo estas Fatma EROĜLAN. Mi estas esperantistino el Turkio. Mi komencis lerni Esperanton en 2013 kaj aktive uzas ĝin ekde 2015. Dum miaj vojaĝoj, mi ĉiam kontaktas aliajn esperantistojn, partoprenas en interretaj eventoj, kaj bonvenigas esperantistojn vizitantajn Istanbulo.

### *Kion Mi Faras en Francio Nun?*

Mi laboras kiel instruisto pri turka lingvo en ŝtataj lernejoj en Mulhouse. Mi ŝatus rakonti al vi pri la programo, kiu ebligis al mi labori ĉi tie.

EILE (Enseignements International De Langues Étrangères) estas laŭvola kurso pri fremda lingvo ofertita al lernantoj en ŝtataj bazlernejoj (CE1 ĝis CM2) en Francio. La programo daŭras 1,5 horojn semajne aldone al la normalaj semajnaj klashoroj, kaj lernantoj povas kelkfoje partopreni kursojn en malsamaj lernejoj. Kursoj okazas posttagmeze post lernejaj horoj.

La programon gvidas instruistoj senditaj de landoj, kiuj havas interkonsentojn kun Francio; ĉi tiuj instruistoj estas kontrolataj de francaj inspektistoj kaj submetiĝas al la principo de laikeco. La ofertitaj lingvoj inkluzivas la araban, kroatan, italan, portugalan, serban kaj turkan. En la regiono, kie mi laboras, nuntempe estas instruistoj pri la araba, turka, itala kaj portugala.

Mi instruas la turkan lingvon en Mulhouse kadre de ĉi tiu programo. Fakte, mi estas plentempa instruisto de la angla lingvo en ŝtataj lernejoj en Turkio. Mi komencis mian laboron en 2012. Mi laboris kiel instruisto de la angla lingvo en bazlernejoj, mezlernejoj kaj gimnazioj. En 2022, mi decidis partopreni la programon. La postulo estas almenaŭ 5 jaroj da sperto laborante en ŝtataj lernejoj. Estas ankaŭ skriba kaj parola ekzameno. Poste, se la elektita lando havas lingvajn kriteriojn, vi devas plenumi ilin. La lando estas elektita unue en ĉi tiu kandidatiĝa procezo. Ĉar Francio estas strikta pri lingvo, ĝi postulas lingvan atestilon DELF B2. Mi pasis la skriban kaj parolan ekzamenojn en 2023, kaj la DELF-ekzamenon en 2024. Mi devis atendi jaron por mia tasko. Mi eksciis, ke mi estos asignita en junio 2025. Post kompletigo de la burokrataj proceduroj kaj viza procezo, mi povis veni al

Francio en novembro. Ĉi tio ne estas dumviva tasko. Mia taskperiodo nuntempe estas unu jaro. Se mi volas resti pli longe fine de ĉi tiu jaro, kaj se la Eduka Ataŝeo ĉe la Konsulejo aprobas, mia taskperiodo estos plilongigita por alia jaro. Entute, mi povus resti en Francio tiel dum 5 jaroj. Mi alvenis ĉi tien nur en novembro kaj mi laboras en Mulhouse kaj la ĉirkaŭa regiono. Mi laboras en 5 lernejoj, kaj en ĉiu lernejo mi havas lernantojn de malsamaj niveloj. Miaj lernantoj estas je malsamaj niveloj, de CE1 ĝis CM2. Ankaŭ, iliaj turklingvaj kapabloj estas ĉiuj je tre malsamaj niveloj.

### *Mia Vojaĝo al Liono*

Mi decidis veni al Liono por mia februara lerneja ferio. Mi jam estis en Francio tri fojojn antaŭe, sed neniam en Liono. Mi aŭdis, ke ĝi estas tre bela urbo kaj tre riĉa je gastronomio. Tial mi dediĉis tri noktojn de mia ferio al ĝi. Antaŭ ol veni ĉi tien, mi kontaktis la Esperantan Klubon. Mi ŝatus danki la prezidanton Marc-Olivier pro lia respondo. Melono, Esperanta membro, akompanis min dum mia kvartaga vojaĝo. Mi esploris multajn belajn lokojn en la urbo kun li, kaj mi dankas lin tre multe pro lia akompano. Danke al li, mi povis ĝui la urbon rapide kaj sen esti sola.



*Marc-Olivier, pascale, Andréa, Adrien, Fatma kaj Melono*

Dum ĉi tiu vojaĝo, mi havis la ŝancon viziti la Esperantan Klubon. Tie, mi ankaŭ havis la ŝancon renkonti novajn esperantistojn. Mi vidis kiom longe staranta kaj establita la Esperanta Klubo estas. Ili havis kongresajn protokolojn kaj fotojn de eventoj ekde ĝia fondo. Mi vere ŝatis havi tian bone establitan kaj aktivan grupon ĉi tie.

Dankon multe al ĉiuj membroj de via klubo pro la tempo, kiun vi prenis por renkonti min. Mi vere ĝojis renkonti vin ĉiujn.

Koncerne tion, kion Melono kaj mi faris en la urbo, ni vizitis la Muzeon de Confluences, la Muzeon de Lumiere, la Muzeon de Belartoj, la Romian Teatron, la antikvan tombejon, la grandajn placojn de la urbo, la belajn skulptaĵojn en la placoj, kaj ĝuis bongustajn manĝojn en ĉarmaj restoracioj. Ni ankaŭ iris al KoToPo por paŭzo, sed ĝi estis fermita. Dum ni turismumis, mi daŭre diris al li, ke mi volas vidi la Flacking-ojn de Ememem, kaj ni decidis spuri liajn verkojn sur la mapo de tempo al tempo.



Mi Trovis Ememem en Ankaru, Sed Ne Povis Trovi Lin en Lia Hejmurbo Liono

Ememem estas strata artisto el Liono, ankaŭ konata kiel la "trotuarpoeto". Ekde 2016, li estas konata pro sia urba arto, kiun li nomas "flacking" (verŝtuko), kaj uzas la pseŭdonimon Ememem. Lia malaltteknologia tekniko estis adoptita de aliaj artistoj tra la mondo, kaj la termino "flacking" (verŝtuko) establiĝis por rilati al ĉi tiu branĉo de strata arto, kiu laboras por ripari trotuarojn. Kvankam liaj verkoj troviĝas ĉefe en lia hejmurbo

Liono, ili ankaŭ videblas en multaj aliaj urboj, inkluzive de Parizo, Torino kaj Milano, Barcelono kaj Madrido, Hamar, Aberdeen, Carlow, Leipzig, Ĉikago kaj Novjorko.

Mi renkontis Ememem-on en 2025 danke al evento organizita de la Franca Konsulejo en Ankaru (ĉefurbo de Turkio). La Konsulejo invitis lin al Ankaru por krei siajn artaĵojn. Li kreis pecojn sur trotuaroj en kvin malsamaj lokoj. Ĉi tio estis tre bone akceptita en Turkio, kaj kiam mi iris al Ankaru, mi sekvis lian laboron. Mi trovis liajn pecojn tre kreivaj kaj tre simpatiaj. La difektitaj trotuaroj de la urbo estis zorge metitaj, vivigitaj kaj riparitaj per buntaj ceramikaĵoj. Foje, malgrandaj mesaĝoj kiel "Voku Vian Patriron" en la lingvo de tiu lando estis aldonitaj al la pecoj. Kaj ĉiam estis ceramika peco kun lia nomo sur ĝi. Ĝi estis kvazaŭ la subskribo de la artisto. Mi inkluzivas kelkajn fotojn de liaj pecoj el Ankaru ĉi tie.



Eksciante, ke Ememem estis el Liono, mi serĉis lin en lia retejo kaj malkovris, ke li komencis sian artan karieron tie kaj ke multaj el liaj verkoj troviĝas tie. Eĉ estas mapo en la retejo. Esplorante la urbon, Melono kaj mi foje serĉis ĉi tiujn verkojn, sed ĝi estis iom seniluziiga. En unu

loko, la municipo faris laboron, kaj la peco malaperis. Ni trovis ĝin en alia loko, sed ĝi estis difektita. Fine, ni trovis la pecon proksime al la Fresque de Lyonnais. Mi kredas, ke ĝi estis unu el liaj fruaj verkoj, ĉar ĝi ne havis ceramikajn pecojn portantajn lian nomon, al ĝi mankis mesaĝoj, kaj ĝi ne estis tiel bunta kiel la aliaj, kiujn mi vidis. La mapo ankaŭ montris tri el liaj verkoj proksime al la antikva teatro. Ni ankaŭ serĉis ilin, sed ne povis trovi ilin; mi kredas, ke ili estis forigitaj. Mi aldonas la fotojn, kiujn mi faris.



Mallonge, mi pasigis kvar tagojn de mia ferio esplorante nekonatan urbon ĝis miaj piedoj doloris kaj renkontante novajn esperantistojn el nia komunumo. Tio estis mirinda sperto por mi.



## ☛ Ĉina vintra poezio - Marc-Olivier GRAZIANI

Pentraĵa surskribo

Rustika lignopordo firme fermita, neĝo abunda ;  
Ŝtipoj sufiĉas por pasigi ĉi-tiun longan nokton.  
Jen la plej trankvila rifuĝo por poeto:  
Poezia libro, kaj incensujo.

唐寅 (Táng Yín), plej kontata nome Tang Bohu (唐伯虎) [1470–1523] - Fama pentristo, poeto kaj kaligrafiisto de la Ming-dinastio

## ☛ Tre fama anekdoto - Marc-Olivier GRAZIANI

Post la kupto de la tre fama kaperisto (korsaro) Robert Surcouf, angla maroficiro, kiu deziris inciteti lin, diris:

“Vi, francoj, batalas por mono, dum ni batalas por nia honoro.”

Surcouf tuj replikas:

“Jes, oni ĉiam batalas por tio, kion oni ne havas!”



## ☛ **La ĵurnalisto estis tro perfekta !** - Pascal VOLDOIRE

La ĉefredaktoro kanadana de *Courier International*, Nicholas Hume Brown (Nicholas H.B.), bezonis kontribuojn por sia reĵurnalo. Ĉi-foje la temo estis tre tikla : pri sanasekuro en Kanado.

Li ricevis artikolojn el Londono, Afriko, Barato aŭ Usono, kiuj ne konvenis al la kanada kunteksto. Tamen mesaĝo de iu Viktoria G. prezentis altkvalitan esplorkontribucion. Plie, Viktoria G. diris, ke ŝi jam kontribuis al aliaj kanadaj reĵurnaloj. Kun siaj kolegoj, Nicholas decidis publikigi ŝian artikolon.

Tiam li komencis pli detale esplori ŝian laboron. Li scivolis pri pluraj detaloj : kie ŝi loĝis, kiel ŝi havis tempon por intervui tiom da personoj — laboristojn, doktorojn ktp.

Kiam li telefonis al unu el la doktoroj, tiu respondis, ke li neniam renkontis tiun ĵurnalistinon. Do li petis de Viktoria G. rendevuon por klarigi la aferon. Strange : li rimarkis, ke ĉiuj frazoj komenciĝis en la sama maniero. Iom kvazaŭ AI-stilo...

Li komencis serĉi informojn pri ŝi en la reto. Iom post iom li malkovris, ke ŝi verkis multajn artikolojn por pluraj magazinoj en Kanado aŭ Britio. Ŝi elektis tre (tro?) diversajn temojn : ornamado, ekologiaj problemoj, laboraj kaj ekonomiaj demandoj, amaskomunikado, novaj (modernaj) teknologioj, juro, ktp.

Mirinda ebleco ! Fleksebla aŭtoro !

Post kelkaj pliaj esploroj li proponis rendevuon per Zoom. Ŝi preferis telefoni. Li demandis, kie ŝi loĝis : en Toronto... sed ŝia adreso ne estis preciza.

Ŝi ne volis paroli pri si mem. Ŝi respondis rapide, per kvazaŭ komputilaj respondoj, precipe al ĝeneralaj demandoj. Post kelkaj minutoj, la virino malsaltis la telefonon.

Poste Nicholas diris, ke neniam antaŭe li diskutis kun iu, kiu mensogis tiel, kaj ke li sciis, ke ŝi mensogas.

Kiu ŝi estis ? Ĵurnalistino kun sinceraj ambicioj ? Friponino ? Li ne sciis, kiu ŝi estis. Eble ŝi estis nenio. Fantazia nomo sen ligo al reala persono, nur nomo kreita de “ateliero” en Londono aŭ aliloke, kie anonimaj verkistoj fabrikas artikolojn por la malsata reto. La fipotencoj povas verki paĝojn el kelkaj ideoj aŭ nomoj de famuloj.



Sed ŝajnas, ke Viktoria ne estas simpla friponino. Ŝi skribis plurajn artikolojn, kiuj priskribis muzikistojn, kiuj kreis “realan” muzikon komence de la dua jarcento. Ŝi konkludis, ke algoritmoj ne povas fari tion. Neniu naiveco ĉe Viktoria G.

Sed AI agas... rapide, silente, konvinke. Ĝi kapablas verki tekstojn kun aŭtoritata tono, sen vereco malantaŭ la vortoj.

La personoj, kies tasko estis kontroli la informojn, estis maldungitaj. La ĉefredaktoroj laciĝas sub la premo de rapideco kaj kvanto. Inter la teksto kaj la vero restas ĉiam malpli da baroj.

Ni devas iĝi kontrolistoj.

## ☛ **Amuza Rakonto : pri kreskado kaj sendependeco** - Marc-Olivier GRAZIANI

En la mezo de la nokto, knabeto ne povas dormi. Li timas mallumon. Post momento, li kuraĝiĝas kaj transiras la koridoron kiu, laŭ li, estas plena je teruraj monstroj.

Li frapas ĉe la pordo de la gepatra dormoĉambro, malfermas ĝin kaj flustras:

- Panjo... ĉu vi povas veni dormi kun mi? Mi timas...

La patrino, duondorma, respondas:

- Kara, vi kreskas. Vi devas lerni esti sendependa.

La knabo silentas momenton kaj rigardas la liton.

- Sed... mi ne komprenas. Paĉjo estas pli granda ol mi. Li devus esti sendependa ankaŭ!

## ☛ Nokto de la Galaksia Fervojo - Andrea BERTRAND

Dum la lernejaj ferioj mi vartas miajn genepojn kaj ni kutimas vizitadi la bibliotekon de mia kvartalo por deprunti librojn kaj DVD-diskojn. Mi mem elektis japanan filmon, nome *Nokto de la Galaksia Fervojo* reĝisorita de GISABURŌ SUGII (銀河鉄道の夜 en la japana, kaj "Train de nuit dans la Voie lactée" en la franca). Bedaŭrinde miaj genepoj foiris antaŭ ol spekti ĝin kaj mi decidis tamen rigardi ĝin antaŭ ol redoni la pruntaĵojn al la biblioteko.

La filmo komenciĝis per foliumado de la titolo de la filmo kun la nomoj de la diversaj kunlaborantoj en la kreado de la filmo kaj en la japana kaj alia lingvo sub ĉiu teksto. Komence mi tute ne atentis ĝin, mi kontrolis miajn mesaĝojn en mia saĝtelefono, sed de tempo al tempo mi levis la kapon kaj rigardis la televidan ekranon, kaj subite mi konscias, ke mi regule tralegas vortojn en Esperanto! Kio! Mi flanken metis mian saĝtelefonon kaj rigardis atente, legis ĉion, kio ruliĝis sur mia televida ekrano. Per la teleregilo de mia DVD-ludilo mi revenis al la menuo por kontroli la elekton de lingvoj: ĉu mi maltrafis la Esperanto-lingvon? Sed tute ne, aperis nur la elekto de subtekstoj en la franca. Mi rekomencis la filmon de la komenco kaj rimarkis, ke ĉio estis skribitaj en la japana kaj Esperanto, ne estis subtekstoj en la franca! Eĉ la titolo de la filmo estis legata en Esperanto : Nokto de la Galaksia Fervojo. Tiurilate vi povas noti, ke la traduko en la francan ne estas la sama, bedaŭrinde mi ne scipovas la japanan por kontroli ĝin.

En la filmo la roluloj parolas japane kaj la francaj subtekstoj aperas malsupre de la ekrano kiel kutime, sed ĉio, kion oni povas legi estas skribita en Esperanto kiel ekzemple en la lernejo la nomoj de la ĉambroj, la tekstoj sur la nigra tabulo, nomoj de la vendejoj en la vilaĝo, nomoj de la stacidomoj, kaj tiel plu.

La filmo rakontas pri du katoj, kiuj vojaĝas per galaksia fervojo tra la ĉielo, kaj temas pri profundaj temoj kiel amikeco, vivo kaj morto. Ĝi baziĝas sur novelo verkita de KENJI MIYAZAWA (1896\_1933) en 1927 sed postmorte publikigita en 1934. Tiu ĉi estis agronomia inĝeniero, pia budhismo, poeto-fabelisto kaj kompreneble esperantisto. Vi povas legi pli da informoj pri li en

vikipedio. Li multe verkis sed fariĝis famulo en Japanio nur post lia morto.

Nun pri la reĝisoro GISABURŌ SUGII (naskita la 20an de aŭgusto 1940). Li volis fari en Japanio tion, kion faris Walt Disney, kiun li admiras, sed la manko de financaj rimedoj devigis lin disvolvi ĉiujn kapablojn necesajn por krei desegnofilmojn: reĝisorado kaj animacio. Li kontribuis al la produktado de movbildaraj serioj por japana televido konata en la Okcidento kiel Astro la roboteto. Li faris ĉi tiun filmon en 1985 kaj estas rimarkinde, ke li volis montri, per transskribaĵoj, la intereson de la aŭtoro pri la lingvo Esperanto.

Fine mi demandas min ĉu tiu filmo plaĉus al miaj genepoj ĉar ĝi estas poezia kaj iom abstrakta. Foje ĝi montris la subakviĝo de la fama Titanic por paroli pri la morto kaj budhisma kredo.

Amaso da DVD-filmoj troviĝas en la biblioteko, kaj mia mano hazarde prenis iun, kiu rilatas al Esperanto (notu, ke nenio sur la kovrilo montras, ke Esperanto estas uzata) !

Kion vi opinias pri tio ?

